

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikkaj
direktoro, Kaunas.

N-o 163
28. 10. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldona
al ĉiu specimena kaj unua numero
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Ankaŭ la 1-a Univ. Kongreso de U.E.P.L. 1924 en Wien.

Al ĉiuj ĉefkomisiitoj de U. E. P. L. kaj al ĉiuj amikoj de la paco.

Ĉar en la sekvonta jaro antaŭ la XVI-a Esperanto-mondkongreso en Wien la Sekcio Aŭstrujo de U. E. P. L. kune kun la aŭstrujaj porpacaj kaj kulturaj organizaĵoj aranĝas la 1-an universalan mondpackongreson de U. E. P. L., kiel aŭstruja ĉefkomisiito mi invitas vin jam hodiaŭ, por ke vi ĉiuj povu prepari vin por tiu ĉi granda tago kaj por ke vi mem ankaŭ povu inviti multajn gesamideanojn por nia unua granda manifestacio. En ĝi ni devas prepari ĉion, kio estas necesa, por atingi la celon, la veran pacon! Per tiu ĉi kongreso ni devas montri al la mondo nian pacemon per faktoj!

Vin ĉiujn mi treege petas, bonvolu en la diversaj urboj kaj urbejoj fari ion similan, kion mi faris kaj faras ĉi tie! Aranĝu kunvenon, invitu la diversajn porpacajn organizaĵojn, preparu kaj gvidu porpacifistajn Esp. kurson, interesigu la porpacajn kaj pacemajn organizaĵojn por Esp., fondiĝu en la pacifistaj kaj similaj rondoj Esp. grupojn, atentigante al nia 1-a mondpackongreso por ke el ĉiuj landoj de Eŭropo kaj el la aliaj kontinentoj venu grandamase la pacifistoj kaj pacemuloj! Granda estas nia celo! La mondo devas ekaŭskulti! Tiu, kiu amas la pacon, venu! Ĉies nepra devo estas, montri la volon de laboro por vera paco! Mi alvokas kaj invitas vin ĝustatempe! Pro tio preparu vin kaj kunlaboru! Dum oktobro kaj novembro ni ferosdos al ĉiuj sekcioj de la pac-organizaĵoj de la tuta mondo kaj al ĉiuj eminentaj pacifistoj en ĉiuj landoj la inviton por kunlaboro al nia 1-a mondpackongreso.

Ju pli grandisile ni ĉiuj povas fari la antaŭlaborojn ĝustatempe, ĉar la invitataj organizaĵoj kaj personoj devas havi sufiĉe da tempo por lernado de Esp., despli grandega kaj efikplena povos fariĝi la sukceso de la 1-a mondpackongreso kun Esp. kiel kongreslingvo. Ju pli vi helpas, des pli gravan influon havos tiu ĉi mondpackongreso je ĉiuj landoj, je ĉiuj pacifistaj organizaĵoj! — Kuraĝe antaŭen!

Universala Esperantista Pacifista Ligo, Sekcio Aŭstrujo
Rudolf Michael Frey,
ĉefkomisiito, Wien III, Bechardgasse 14.

Per-Esperanta demonstracio por la paco en Wien.

Kiel antaŭkio al la 1-a Universala Packongreso de U. E. P. L. okaze de la XVI. Universala Kongreso de Esperanto en Wien 1924 vendrede la 28-an de septembro en la salonego de la granda Esp. ekspozicio en la Foira Palaco estas aranĝita tre sukcesplena „mondpacko-vespero“ de U. E. P. L., al kiu la federacia kanceliero, t. e. ministrara prezidanto D-ro Seipel, mem grandvalora pacifisto, pro la ĉeesto de gravaj delegitoj kaj estroj de la aŭstrujaj porpacaj kaj porkulturaj organizaĵoj sendis oficiale la ministerian konsiliston D-ron Fuchs, la ministro por socia administrado la sekcian konsiliston D-ron Hell kaj la Aŭstruja societo por la Ligo de Nacioj min. kons. Reinhard. Inter la ĉeestintaj honor-gastoj oni vidis precipe la kortegan konsiliston landlernejan inspektoron D-ron Wollmann kaj la ĉefsekretariaron de la Internacia Virinligo por Paco kaj Libereco f-inon Wettstein, kiuj ambaŭ treege kaj influŝe laboras por la enkonduko de Esp. en la lernejojn resp. en la pacifistajn organizaĵojn. Post salutvortoj de la invitinta aŭstruja ĉefkomisiito de U. E. P. L. Rudolf Michael Frey, kiu akcentis la necesan kunlaboron de ĉiuj inoj (patrinoj kaj edzinoj), kiuj dum la

paroladis vico de oratoroj — eĉ por la mondurbejo Wien nepre neordinara, diversspeca kaj rimarkinda — el la plej diversaj porpaco- kaj kultur-organizaĵoj. Unue profesoro Beck de la Societo de la Amikoj (Kvakeroj) menciis la bonfarantan agadon de tiu ĉi societo, laŭdante la gravan kunhelpon de Esp. rilate la alproksimiĝon de la popoloj. La dua oratoro estis la famkonata pacifisto Prelato D-ro Giesswein, prezidanto de la Hungara Pacifista Societo kaj ankaŭ prezidanto de U. E. P. L. Lian longan temperamento plenan paroladon ĉiuj tre atente kaj entuziasme aŭdis. D-ro Giesswein subtekis, kiom estas necese, ke ĉiuj universalaj pacemaj organizaĵaj laboru per Esp. plej simplamaniere kaj plej efikplene, por atingi la mondpacon, se Eŭropo per siaj ĉiamaj malpacoj kaj revolucioj ne pereu! En la nomo de la aŭstruja sekcio de la Internacia Virin-Ligo por Paco kaj Libereco paroladis brile ĝia estrino s-ino Lotte Heller. La kvara, tre bona oratoro, estis la verkisto kaj eldonanto de „Friedenswarte“, gravega monata porpaca organo (de nun al Esp. simpatia), s-o Rudolf Goldscheid, prezidanto de la Aŭstruja Pacifista Societo. Li de nun tute aprobas Esperanton. Lia granda influo treege utilas al la nova Esperantista porpaca ligo: U. E. P. L.! Poste tre efikplena estis la parolado de f-ino Hoysted el Anglujo en la nomo de la „Fellowship of reconciliation“ (Repaciga Ligo). La lasta lertega oratoro estis Profesoro D-ro Longo, fervorega Esperantisto, en la nomo de la bontemplanoj. Liaj bonegaj vortoj faris grandan impreson kaj entuziasmigis la multnombrajn ĉeestantaron. Evidentiĝis al ĉiuj kiom valora estas Esperanto por la pacifista movado. R. M. F.

La 1-a kongreso de U. E. P. L. daŭros 5 tagojn kaj okazos precize antaŭ la XVI-a. Tiel la granda porpacmanifestacio en ĉeesto de la registaro estos unu tagon antaŭ la malfermo de la XVI-a. La Esperantistoj, kiuj havas ne multe da tempo aŭ mono, sed intereson por tiu ĉi speciala kongreso, pro tio bezonas nur unu tagon pli. La sciigoj pri nia 1-a aperos ĉiam en ET, „Esperanto“ de UEA kaj en „La Lumturo“.

Ĉiuj amikoj de la paco estas treege petataj, ĉi am traduki la sciigojn de U. E. P. L. en la naciaj gazetoj!

La oficialaj institucioj de Esperanto laŭ la lastaj decidoj.

Centra Esperanto Komitato (C. K.)

Prezidanto s-o Edm. Privat, Genève (Ĝenerala Propagando), s-o Gabriel Chavet, Paris (Internaciaj Aferoj, Centra Oficejo, Paris), Prof. D-ro J. Dietlerle, Leipzig-Schl. (Instruado kaj Literatura), s-o R. Hromada, Praha (Di blika Informado), s-o Kenn, Lyon (Ameriko kaj la Oriento), s-o W. M. Page, Edinburgh (Financo).

Konstanta Reprezentantaro (K. R.) de la Naciaj Societoj.

Hon. Prezidanto: s-o Generalo Sebert, Paris, Prezidanto: s-o John Merchant, Sheffield, Sekretario: s-o H. Edmonds, London.

Lingva Komitato (L. K.) kaj Akademio.

Prezidanto s-o Prof. Th. Cart, Paris, Vicprez. s-o J. M. Warden.

Universala Esperanto Asocio (UEA).

Prezidanto: s-o Ed Stettler, Bern, Ĝen. Sekretario: H. Jakob, Genève.

Konstanta Kongresa Komisiono (K. K. K.)

Prezidanto s-o J. M. Warden, Edinburgh.

Esperanto-Akademio.

Prof. Cart estas ree elektita Prezidanto de la Akademio ĝis la jaro 1925. — La plena estraro de la Akademio estos elektata antaŭ la fino de oktobro.

La Akademio elektis kiel akademian korespondantojn:

- S-on Setälä (finna lingvo)
- „ Tellini (ladina lingvo)
- „ Sola (kataluna lingvo)
- „ Leon Zamenhof (pola lingvo)
- „ Rollet de l'Isle (sciencia kaj teknika vortaro).

Socia vivo.

Lernejo-reformo en Germanujo.

Kiel aliaj progresmovadoj ankaŭ la lernejo-reformo rimarkinde plifortiĝis ĉe ni post la revolucio. Tamen ni ne devas diri, ke la novaj pedagogiaj ideoj nur estas antaŭenpuŝitaj per la revolucio, sed ke ili jam estis konataj al almenaŭ sentataj deposedoj, eĉ jardekoj. Alie ili ne povus montriĝi per la sama forto en tiuj landoj, kiuj ne vidis revolucion. Kaj oni preskaŭ ne povas paroli pri nia germana lernejo-reformo, ĝi estas vere internacia reformmovado.

La unua de tiuj ideoj estas la labor-instruo, al kiu dediĉis legindan artikolon sinjoro Degen en la kolekto „Vendreda klubo“. Ĝi naskiĝis el la kontrasto kontraŭ la sole intelekta instruado de la malnova lernejo, nomata tial lern-lernejo. La laborlernejo akcentas aŭ la korpan edukadon male al la sole cerba okupado kaj tial praktikas manlaboron, ekzemple lignajn kaj ĝardenan, aŭ preferas propran agadon, ankaŭ spiritan de la lernanto male al la pasiva sintenado de tiu dum la instruado. Se la manlaboro ne nur havas la celon ekzerci la korpon, doni lertecon kaj sperton por la venonta vivo, sed ankaŭ produktas ajon por la propra konsumo de la lernejoj, oni nomas tiun lernejon produktadlernejon, pri kiu en germana lingvo precipe verkis profesoro Paul Oestreich. La plej radikala formo de tiu sistemo sin trovas en verko de rusa aŭtoro, „La laborlernejo“, de Blonski, kies traduko estus inda tasko por rusa Esperantisto-pedagogo. Per propra kunlaboro de la lernanto, kiel permana tiel spirita, la lerneja agado pli kaj pli similas al la vera vivo, kie ĉiuj fortoj interalie kompletigas, kaj la unuflanka lern-agado de la infano pli kaj pli iĝas plena infan-konforma vivo. La vivo-lernejo estas la plej alta reformpedagogia ideo de la nuntempo.

Per la socia kaj politika postuloj, ke la multformeco de la lernejo ne malhelpu iun infanon iri la rektan vojon al tiu profesio, kiu respondas al ĝiaj talentoj kaj kvalitoj, ekstaris la programo de la unueco-lernejo, kiu jam antaŭ la milito energie estis disvastigita de la germana instruista unuiĝo.

Ĉiuj skizitaj formoj ne kontraŭstaras unu al la alia, sed kunligiĝas en varia maniero. Ankaŭ la motivoj estas diversaj, de la politikaj, partiaj ĝis la religiaj, kiuj ĉefe devenas el la junulara movado. Tiu donis ankaŭ al la nova vivo-lernejo multe da sindonaj edukistoj, kiuj laborante, migrante, lernante kun la lernantoj estas ne la instruistoj, sed la amikoj de ili. La interrilato inter pedagogia reformo kaj junulara movado estas la fundamenta penso de „Sociologia pedagogio“ de D-ro Siegfried Kawerau.

En la tuta movado oni povas rimarki la emon al vasta ampleksado de ĉiuj aperaĵoj. La unuopaj lernejoj kaj instruistaj grupoj etendiĝas trans sin

mem. De la infan-gardeno*) ĝis la universitato oni akcelas komunan konstruon de la tuta eduko, instruoj kaj klerigado. La sociala protekti-ado elprenas el la publika edukado ĉiujn por ĝi ne taŭgajn infanojn kaj transdonas ilin al ĝardenoj kaj hejmoj. Kuracistoj prizorgas la malsanajn, ĉefe la psikopatojn (kurac-pedagogio); la profesio-konsiletoj aplikas la plej modernajn metodojn de eksperimenta psikologio. Ciel vivo, cellopodo, varieco, kunigo! La Esperantistoj havas apartan organon por tiuj problemoj en „Novaj Tempoj“, sed ankaŭ en ne-fakaj rondoj la pedagogia intereso estas vigla, kio pravigas ĵurnalojn de ĝenerala karaktero kiel „Esperanto Triumfonta“, doni al siaj legantoj tiun resuman raporton.

Statuto de la Ligo de decidaj lernejo-reformanoj.

A. Celo de la Ligo.

§ 1. La Ligo de decidaj lernejo-reformanoj celas la kunigon de ĉiuj, kiuj volas kunlabori por la renovigo de la edukaj kaj instruaj aferoj laŭ la ideo de la junulara movado kaj laŭ la kulturrevoluado celanta socialan komprenon kaj novajn formojn de la vivo.

§ 2. Ĝenerala kondiĉo por membreco estas decida konfeso al la ideo de la respubliko kaj al la ideo de sociala kaj tuthomara komuneco.

§ 3. La Ligo reprezentas nenian kastajn aŭ profesiajn interesojn kaj servas al nenia eklezia aŭ politika partio, sed laboras ekskluzive kaj en plena libereco por la efektigo de siaj pedagogiaj postuloj.

B. Principoj de la Ligo.

§ 4. La tasko de la nova lernejo — t. e. la tutampla komunumo por instruoj kaj eduko de la tuta popolo — estas la eduko de la juna homo al korpe plenformita, spirite libera, volforta, anime impresbla kaj socialama membro de la popolo kaj homara komunumo.

§ 5. Per la vivoformoj de la nova lernejo estos kreata libera vojo por la evoluado de la junularo al propra valoreco kaj al praktikado de vera gvidkapableco. La fundamento de la nova lernejo estas la eduko-komunumo el ĝenerantoj, gepatroj kaj geinstruistoj, kies direktanto estas la porlerneja komitato. Gepatra delegitaro, lerneja komunumo kaj lernantara memadministracio estas la organoj de tiu eduka komunumo.

§ 6. Koncerne la konstruon de la nova lernejo la Ligo postulas:

1. Liberajn, de ekonomiaj konsideroj ne influatajn klerigajn instituciojn per starigo de elasta unueco-kaj vivo-lernejo, diferencigita interne (t. e. nur laŭ direkto kaj intenco de la talentoj). Ĝi estu subtenata per ĝenerala, sociale grandigita imposto porlerneja.

2. Transformon de la ĝisnuna (t. n.) lernejo kun ĝia ekskluziva periodo de scioj al la produktad-lernejo, kiu vekos ĉiujn junulajn fortojn, kiu egale taksos kaj akcelos la intelektajn, teknike metiajn kaj artistajn talentojn, kiu formas korpore kaj instinktaron kaj evoluigos socialan konscion.

3. Instruon kaj grupigon de la instruistaro laŭ individuaj pedagogiaj kvalitoj sen starigo de kastaj aŭ valoron fiksanaj diferencoj; krome la utiligon de ĉiuj pedagogiaj talentoj el la popolo.

4. Anstataŭigon de superuleco kaj subuleco inter la lerneja kolegoj per kolegaj labor-komunumoj.

5. Sufiĉan influon de la instruistoj kaj edukaraj gitoj al la direktado de la instruoj kaj edukaj aferoj.

El la parto C: „Organizo de la Ligo“ ni nur tradukas unu frazon el § 12: Interne de la Ligo povas esti laborkomunumoj laŭ lernejo-specoj, intereskampoj ktp. por traktado de specialaj problemoj.

Otto Bonte, studokonsilisto, Frankfurt a. M. 10, Gartenstr. 107. (Esperanto-Reprezentanto de la Ligo.)

*) Infan-gardeno laŭ Froebel ktp.

Listo de malsanigaj laboroj.

La Servo pri Industria Higieno ĉe la Internacia Labora Oficejo lastsempe konsideris gravan problemon komisiitan al la Oficejo de la Konferenco en Washington, tio estas, la redakcio de listo de malsanigaj laboroj en industrioj. Tiu ĉi estas demando, kiu de longe atentigas la personojn interesigantajn pri industria higieno.

La Oficejo eldonos, laŭ enciklopedia formo, la informojn akiritajn per ekzameno de statistikaj kaj aliaj donitaĵoj rilataj al la medicina kaj higiena aspekto de la problemoj. Aparta artikolo enhavas ĝeneralan diskuton pri industria higieno, toksikologio, industria antaŭzorgo, protekto kontraŭ malsano, kuracista helpo, individuata sano, urĝaj flegoj (first aid), ktp.

Aliaj artikoloj traktas la teknikajn aspektojn, la patologion, la specialajn higienajn rimedojn kaj la legdonon, rilatajn al ĉiu laboro aŭ industrio klasifikita kiel malsaniga aŭ danga.

Por certigi, ke ĉiu temo estu traktata inter-nacie, la Oficejo klopodas por ricevi la kunlaboron ne nur de sia Konsulta Komitato pri Industria Higieno, sed ankaŭ de la plej eminentaj

spertuloj de diversaj landoj: Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakio, Belgio, Francujo, Germanujo, Granda Britujo, Italujo, Nederlando, Polujo, Svedujo, Svisujo, Usono, ktp.

Pli ol tridek scienculoj ĝis nun promesis al la Oficejo sian kunhelpon en la preparo de ĉirkaŭ cent artikoloj rilataj al la plej gravaj industriaj venenoj kaj malsanigaj laboroj.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (saur postkarto al aparta folieto uzifianke skribita, sed ne inter administraci al privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Afriko.

Kabo Verda.

St. Vincent. Angla samideano s-o Heath tie propagandas Esperanton.

Ameriko.

Ĉilio.

Oni skribas al ni el Santiago de Ĉilio, ke la Esp. movado progresas kvankam tre malrapide. En la nur hispanlingva lando je la pacifika oceano oni ne sentas tiom la necesecon de internacia helpa lingvo.

Panam.

En pluraj lokoj en la kanal-zono estas samideanoj. Speciale aktivaj estas s-oj Young kaj Carter en Balboa Heights.

Peruo.

Ankaŭ tie la movado progresas nur malrapide. Amikoj en Ĉilio sciigis al ni la morton de malnova samideano D-ro Frederico Villaréal, L. K., rektoro de la Universitato de Lima. Rektan informon el Peruo ni ne ricevis. Ni bedaŭras la fakton, ĉar per tio nia movado perdis eminentan reprezentanton, kiu povis grave helpi nian movadon en tiu lando. Antaŭ nelonge ni ankoraŭ ricevis la de D-ro Villaréal eldonitan matematikan gazeton kun kelkaj notoj en Esperanto.

Azio.

Ĥinujo.

En junio okazis en urbo Harbin (Menguŝio) la jubileo pro 25-jara ekzisto de Ĥina Orienta Fervojto. Ĥinoj kaj rusoj aranĝis grandan ekspozicion. Bilde, karte-diagramo estas montrita la laboro de Fervojto, eduka, agrikultura kaj kultura laboroj, ekonomia, banka ktp. Ankaŭ Esperantistoj ricevis sufiĉan lokon por sia ekspozicio. Manguria Esp. Societo sukcese ekspoziciis diagramojn de Esperantomovado, tabelojn kaj raportojn sumitajn pri tiumonda stato de Esperanto, anojn, koncizajn sciigojn granditajn pri konferencoj en Ĝenevo kaj Venecio, alĝojn pri Esp. ruse, germane, japane kaj Ĥine, fotografiojn, skizon de gramatiko, entute 26 diverskolorajn murbulojn kun grandaj portretoj de Majstro Zamenhof kaj de s-o Kazi-Girel (fondinto de la societo en jaro 1908) kun bela standardo, kiun s-o Vonago alveturigis el la VII-a Univ. Esp. Kongreso, kun speciala dediko al la societo. Ankaŭ Esp.-gazetoj estas elmetitaj. Al energio de la prezidanto s-o P. Pavlov (estro de Meteorologia Scienco) oni ŝuldas ĉiutage deĵoron. Donas klarigojn: s-oj Gurskij, P. Pavlov, Vonago (el Vladivostok) kaj I. Serisev. Senagaj propagandiloj estas disdonataj. Post fino de la du-semajna ekspozicio la Societo de Studo de Mangurio aranĝos el la ekspozicioj Muzeon konstantan kaj oni disponigos (jam promesite) al la Esp. Societo lokon por la ekspoziciaĵaro. I. Serisev.

Eŭropo.

Anglujo.

London. „George Bernhard Shaw“ estis la temo de parolado de s-o S. J. Smith ĉe Londona Centra Klubo, vendredon, 28. sept.

La temo prilaktis lian vivon, lian levigon al fameco ktp. kaj ĉiuj multajn el liaj famkonataj diroj. Post cenzo de liaj teatraĵoj, kion ĉiu frege ĝuis, s-o S. J. Smith prezentis al la klubo la prologon de „Androcles kaj la leono“, mem rolante Androcles-on kun s-o Lane kiel la leono kaj fino Halady kiel la edzino. Oni portis la ĝustajn kostumojn.

La klubo ja devas esti fiera, ke ĝi enhavas tiajn talentulojn, kia s-o Smith.

Vendredon, 12. okt., s-o Lane malfermis praktikan debaton per Esp. „Ke la fumado estas malbona“ donante 25 kialojn. Fino Halady kontraŭstaris.

Resume: La fumanojo (la plimulto de la ĉeestantoj) konfese, ke Lane estis pli-malpli prava, deklaris, ke ili ne intencas forlasi la kutimon, ĉar per la fumado ili ricevas pli da plezuro ol korpomensan difekton.

La vodonanto post la debato favoris Finon Halady je migranda plimulto. E. R. Reed.

S-o John Merchant, Sheffield, prezidanto de la Konstanta Reprezentantaro kaj de la Brita Esp. Asocio, ius faris sukcesplenan propagandan vojaĝon tra Skotlando. Unue li vizitis Aberdeen, en kiu urbo li paroladis al bona aŭditoro kiun prezidis Sir James Taggart. Poste en Glasgo li paroladis al 400 personoj sub prezido de Prof. J. E. McFadyen, D.D., kaj proksiman vesperon en la Komerca Cambio de Edinburgo antaŭ 100 personoj. En ĉiuj paroladoj li atentigis pri la gravaj laboroj de la Komerca Konferenco en Venecio, kies prezidanto li estis, kaj vekis multe da intereso pri la uzo de Esp. en komercaj rondoj. Gazetoj raportis favore kaj kursoj starigis. W.M.P.

Aŭstrujo.

Laŭ la „Volkszeitung“ de Vien estas organizita Esp. ekspozicio en kvar ĉambroj de la Foira Palaco. Ĝin vizitiis la polica prezidanto Schober. La ekspozicio malfermiĝis je la 4. okt.

Bulgarujo.

Sofia. La 16. sept. okazis la jara kunveno de la Sofia sekcio. Oni konstatis, ke kvankam la laboro de la sofiaj gesamideanoj estis fruktporta, ĝi tamen ne estis egale intensa kiel tiu de la provincaj grupoj, kompare kun la grandeco de la ĉefurbo. Realigita buĝeto 12000 levoj. Oni elektis novan estraron: prez. At. D. Atanasov, sek. -kas. Boris Pančov, bibl. Mara Zlatirova. Kontrola Komitato: G. Fandikov kaj Ivan Dobrev.

Breznik. Okazis la jarkunveno de la loka grupo „Betulo“. Elekta nova estraro: prez. Marin Hristov, vicprez. Asen Dortulov, sek. -bbl. Asen Bunjulov, kas. Boris Durov, kontr. komitato: F-inoj Vera Dimitrova kaj Rajna Mileva.

Ŝumen. Je la 29. aŭg. okazis la jarkunveno de la grupo „Vekiĝo“. Elekta nova estraro: prez. Ilija Silvestriev, vicprez. An. Radeva, sek. Belčo Pavlov, krs. F-ino St. Spiridonova, bibl. Kir. Boguinski. Nova adreso de la grupo: Belčo Pavlov, str. Cehlarska 952.

v. Sadovec, Lukovitsko. Fondita nova grupo „Aŭroro“, kiu aliĝis al BES. Prez. Seĵko Pironski, sek. Atanas Lakov.

Francujo.

Perpignan. Novaj kursoj je la 3, 4 kaj 5. okt. „Pacamo, Esperantista Oficejo“ (6 Rue de la Savonnerie, Perpignan), kies direktoroj estas la fraj Lech, organizas la propagadon en la regiono. S-ano Jean Lech estas nun en Nerbonne por restarigi la antaŭmilitan grupon per helpo de la Mediteranea Federacio.

Germanujo.

Bonn. Dum festo de surdmutuloj komerca instruisto John el Godesberg faris paroladon pri la signifo de Esp. por surdmutuloj D-ro Rung, membro de la loka grupo, tradukis la paroladon en la gestan lingvon. La kunvenintoj decidis fondi grupon de surdmutulaj Esperantistoj kaj rapidigi la preparojn pri starigo de Esp. kurso. M.B.

Wiesbaden. En la populaliernejo (Boseplatz) komence de oktobro komenciĝis kurso por komencantoj (14 p.) kaj kurso por progresintoj (20 p.). Gvidanto de ambaŭ kursoj estas instruisto Kurt Schönbich. La gazeto „Esperanto Triumfonta“ estas elmetita en la legejo de la „Kurhaus“.

Freiburg (Silezio). En septembro komencis en la senreligia lernejo 2 kursoj kun 26 knaboj, gvidanto instruisto Breuer. La 3.9. okazis propaganda vespero. S-o Klien el Striegau parolis pri la XV-a Kongreso en Nürnberg kaj aranĝis Esp. ekspozicion. Semajnon poste komenciĝis 2 kursoj kun 55 personoj. La gesamideanoj volos fondi grupon la 15. dec. je memoro de nia Majstro.

Schweidnitz. Tie parolis pri la XV-a Esp. Kongreso en Nürnberg la 17. 10. vespere s-ano Klien. Al kurso aliĝis 8 pers. Ĉe la kurso de „Laborista Esp. Grupo“ partoprenas 14 gekamaradoj.

Saarau. La 23.9. „Sileo“ aranĝis tie ĉi propagandan tagon. Esp. ekspozicio kaj paroladoj de s-oj Habelok-Breslau kaj Klien-Striegau pri neceseco de Esp. Sukceso: kurskomenciĝo kun 16 p. Gvidanto estas s-ano Schiller, instruisto en Laasan apud Saarau.

Ottmarchau. Ĉi tie okazis la 7. 10. Esp. ekspozicio kaj propaganda parolado, aranĝita de s-o A. Jezirowski. La sukceso estis tre bona. Al kurso aliĝis 54 p.

Striegau. Dum la somero okazis diversaj propagandaj aranĝoj. La 12. 10. komenciĝis kurso ĉe la populaliernejo kun 21 personoj, la 17. 10. fakultativa kurso ĉe la populaliernejo kun 24 knaboj. La 24. 6. okazis en la arbara gastejo „Buschmühle“ amika kunveno Partoprenis gesamideanoj el Breslau, Schweidnitz, Weldenburg, Freiburg kaj Sianowitz.

Italujo.

Sagrado Friuli. La UIEA-delegito s-o V. Foschian sciigas nin: La 2.9. la fama oratoro D-ro Arturo Ghez el Trieste parolis en la loka teatro antaŭ grandombra aŭditoro pri deveno kaj graveco de lingvo Esperanto. Estis varme aplaudita kaj sekve s-ino Stacul malfermis kursojn kun pli ol 50 p. ĉe la populaliernejo. E. J. Gradisca malfermis duan kursojn kaj privatajn lecionojn donas profesorino Pardo.

Latvio.

Riga. La novelektita estraro de Esperanta Societo konsistas el: s-o Krasiņis, prez., s-o Leiskalns, vicprez.; s-o Krogers, ĉefsek. Komitataroj: Indra, Grot, Ĉaĉe kaj Fabricius. La kunveno de R. E. S. okazas en la Kastelo de Respublika Prezidanto. En Latvio estas Esperantistaj grupoj en la urboj: Riga, Jelgava, Aluksne, Daugpils, Priekule, Rezekne. Komenciĝas Esp. movado ankoraŭ en aliaj 5-6 urboj. En ĉefurbo Riga organizigas ius dua Esperantista societo kun ĉirkaŭ 100 anonciintoj en transiera antaŭurbo Pardauga. Fondiĝis dua en Latvio Esperanta Kantista Ĥoro. Okazas eksterkaj rolprojetoj de Komedia Esperanta Trupo. La poŝta adreso de R. E. S. estas: Riga, Latvio, Pasta kaste 380. E. Gr.

Litovujo.

• Pasvalys. La 30. sept. ĉi tie okazis la publika pri-esperanta parolado de s-o Liudas Alsieka kiel la ekspozicio de Esperantaj libroj, gazetoj kaj korespondantoj. Precipe grandan intereson vekis rakontoj pri la XV-a kaj pri la eksterlandaj vojaĝoj. Fondiĝis grupo por lerni Esperanton. Organizas grupon la distrikta inĝeniero s-o A. Grincevičius.

Nederlando.

Rotterdam. La laborista klubo „La Espero“ la 4. okt. aranĝis novan kurson en kiu partoprenas 25 p., gvidanto estas s-o W. de Jong. La supre nomita klubo okazigis sian jarkunvenon, la malnova estraro estis reelektita.

s-Gravenhage. Post konstanta propagando per anonco en diversaj urbaj gazetoj s-o I. Ravestijn ir. komencis la 17. okt. kursojn por komencantoj.

Polujo.

Kraków. La „Societo Esperanto“ havis en septembro kaj oktobro 2 „mencindajn preĝojn, nome tiujn de f-ino Weinsberg; Raporto pri la XV-a; kaj de D-ro Blassberg; pri la eminenta Esperantisto Universitata Profesoro Dybowski. Ĉeestis po ĉ 15 personoj. Kursoj aranĝitaj ankaŭ en socialista grupo.

Portugalujo.

Lisboa. Dank' al klopodoj de kelkaj samideanoj ius fondiĝis Esperantista Rondo Amikeco, kies provizora sidejo estas Rua da Caridade 22. La rondo estas tute neutrala. Baldaŭ malfermiĝos la unuaj kursoj. Renkontejo: bierojo Ribadouro, Avenida da Liberdade 113A. (Oni parolas Esperante!)

Rumanujo.

Braila. S-o Franco Cossutta, del. de UIEA, malfermis kursojn perfektigan.

Bucuresti. S-o kuracisto-kapitano D-ro Iosif gvidas kursojn por la membroj de la Esperantista grupo „Per ni mem“.

Caransebes (Banato). La 1. okt., posttagmeze la tiea Esperantista grupo entombigis samideanon, 26-jaran presiston Oskar Behabetz, kiu sinmortigis, haviĝe en sia poŝto la poemon „Ĉu vi memoras?“. En la tutejva sekvantara la verdstelan bukedon kun Esperantoteleka rubando portis f-ino Hilda Emmer, s-anoj Guttmann kaj Siurm.

Malpermesitaj Esperantlingvaj gazetoj en Rumanujo.

La rumana registaro malpermesis la enporton de la gazeto „Sennacieca Revuo“ kaj „Der Arbeiter Esperantist“.

Rusujo.

Astrahan. Esperanta movado post la somero ankoraŭ ne plene rekompencis.

Refunkciis Esperantista rondeto ĉe laborista klubo de 5. oktobro.

Balcaŭ refunkciis Esperantistaj rondetoj ĉe laboristaj kluboj „Leitjanat Smid“ kaj „Naemjen“.

La Societo Esperantista mem ne organizas kursojn kaj gvidas la rondetojn.

SAT-grupo ne laboras.

La Societo Esperantista intencas aranĝi la ekspozicion de Esperantistoj. Ĝia adreso estas: Rusujo, Astrahan, Kanada 111, Stio. B. A.

Ĉu aparta balkana kongreso Esperantista?

„Bulgara Esperantisto“ raportas, ke Bulgara Esperanto Societo, interkonsentinte kun la prezidanto de la C. K. D-ro Privat, decidis, se eble, aranĝi balkanan Esperanto-konferencon en Sofio en somero antaŭ la kongreso de Vieno. Oni interkonsentis pro tio kun la Esperanto-centroj en Rumanujo, Jugoslavio, Konstantinopolo kaj Ateno.

Geologio.

Rimarkinda natur-fenomeno.

En la Kaspia Maro en la proksimumo de la promontoro de Aŝperon, proksimume du verstojn de la marbordo, subite ekestigis insulo. Esploro de ĝia karaktero konstatigis agantan nafio-fontanon. Ĝi samtempe erupcias ŝtonaĵojn, inter alie kuprominaĵojn.

Internacia trafiko.

Aerveturado.

Transatlanta aertrafiko.

En 30 horoj de Sevilla al Buenos-Aires. Post longaj pritraktadoj efektive de la projekto de aerveturada servo de Sevilla al Buenos-Aires estas certigita. Se komplikoj ne okazos, la servo funkcios de post aprilo aŭ maŭ venont-jara.

La projekto de aertrafiko inter la eŭropa kaj la amerika kontinentoj devenas de la germana grafo Zeppelin, la konata, mortinta konstruisto de aerŝipoj. Li antaŭ jaroj jam pro tio ĉi projekto faris meteorologiajn observojn kaj mezuradojn en Hispanujo kaj en la atlanta oceano. Laŭ la informoj de la entreprenanta hispana-amerika kompanio oni ekkomencos la komunikigon per kvar grandaj pasaĝer-ŝipoj, kapablaj transporti 30 pasaĝerojn kun pakajoj. La vetura daŭro estos 30 horoj, sed oni esperas ĉe favora vetero ankoraŭ mallongigi ĝin. Oni elektis la sudan linion trans la oceano, ĉar tie la klimataj kaj meteorologiaj kondiĉoj estas pli favoraj ol sur la norda linio, kiu sekvas la vaporŝipoj. Oni ankaŭ kalkulas, ke post certa tempo ekzistos komunikigo kun la nordamerika kontinento. La kompanio starigos aervetur-servojn en tuta Eŭropo, kiuj ebligas transporti la vojaĝantojn al la hispana transfluga haveno. Ĝi kredible ankaŭ zorgos pri aer-trafiko inter la amerikaj sudo kaj la nordo. La nombro de la transflugoj povas esti pliigata laŭ bezono.

Foiroj kaj Ekspozicioj.

Konstanta foiro en Petrogrado.

La Komerca Ĉambro de Petrogrado fondis konstantan specimenan ekspozicion. Oni disponigas senpage la ekspozician lokon. La kostonoj por vitrokestoj ktp. devas preni sur sin la interesato. Petojn pri lokigo oni devas adresi al la nomita komerca ĉambro.

Internaciaj kongresoj.

Propagandistojn pri la praktika uzo de Esperanto en la koncernaj urboj interesos la sekvanta listo de internaciaj kongresoj okazantaj ĝis fino de la jaro.

- 5. 11. Boston, Mass., Nacia kongreso de la Amerika Societo de Laborestroj en la lan- kaj lanfadenfabrikado.
- 5. 11. Moskva, Nacia kongreso de la Centra Turusa Unio de Konsum-Kooperativoj.
- 12.—17. 11. Bourges, Nacia kongreso de Ĝenerala Unueca Federacio Labora de Francujo.
- 15. 11. Genève, Dua ĝenerala Konferenco de Trafiko kaj Transito.
- 22.—29. 11. London, Nacia kongreso de Publikaj Laboroj, de Lands'rajtoj kaj Transporto.
- 5. 12. New York, Nacia kongreso de la Amerika Societo de la Inĝenieroj de Mekaniko.
- 5. 12. New York, Nacia kongreso de la Amerika Societo de Inĝenieroj de la Malvarmigita Industrio.
- 4. 12. Pittsburg Pa., Nacia kongreso de la Patrona Asocio de la Podetalaj Komercestroj de Vitrajoj.

Al hodiaŭna numero estas aldonita la oktobra „Internacia Komerco“.

Renovigu vian abonon!

Kontraŭ-alkohola movado.

Internacia Instruista Ligo kontraŭ Alkoholisimo.

Vendredon la 24-an de aŭgusto dum la 17-a internacia kongreso kontraŭ alkoholisimo en Kopenhago 24 reprezentantoj el 10 ŝtatoj fondis „Internacian Instruistan Ligon kontraŭ Alkoholisimo“ apogante sin sur decido farita 1909 en London kaj sur sekvintaj preparaj laboroj. Ĝia celo estas laŭ § 2 de la ŝtato:

La internacia instruista ligo kontraŭ alkoholisimo intencas akceli la interrilatojn inter la abstinantaj instruistoj de ĉiuj ŝtatoj kaj iliaj asocioj, subteni la kuniĝojn por antialkohola instruado de la infanoj, efektivegi enkondukon de oficiala higiena instruado en la lernejoj de ĉiuj landoj kaj interrilatiĝi kun la junulara movado de ĉiuj landoj.

Kiel membroj de la estraro estis balotataj: Lektoro Suamela, Helsinki (Finlando); Lerneja inspektoro Robert Johansson, Jönköping (Svedujo); Seminaria instruisto Eggebaek, Haveslev (Danujo); Profesoro D-ro Piasecki, Poznan (Polujo); Frieda Feichtinger, Wien (Aŭstrio); Landa supera lernejo-konsilisto unversitata profesoro D-ro R. Strecker, Eisenach, prezidanto; Franziskus Hähnel, Hoseneichen-Wöllingsbüttel bei Hamburg, sekretario; Wilhelmine Lohmann, Bielefeld, trezoristino. La lastaj tri membroj estis elektataj el unu lando, ĉar Germanio estis fiksata loko de la direktorio.

Oficiala informilo estas la „Scientific Temperance Journal“ Boston (Mass. Usono). Honoraj prezidantoj estis nomataj la ĉeestantaj liganoj: sinjorino Alli Trygg-Helenius, Helsinki (Finlando) kaj sinjorino Cora Stoddard, Boston (Usono).

La reprezentantoj de ĉiuj ŝtatoj estas petataj atentigi en siaj landoj la unuigojn de abstinantaj instruistoj pri tiu fondo.

Kotizojn por plua organizado de la ligo akceptas en naciaj monbiletoj sinjorino Wilhelmine Lohmann, Bielefeld, Roonstrasse 5 (Germanujo).

Scienco.

Sciencaj ekspedicioj en Sovet-Ruslando.

Ekspedicio por esploro de la kondiĉoj per kiuj povas esti konservata la per formorto minacata bizono post ne longe jros en la Kuba-teritorio (Kaŭkazo). Ankaŭ al la kastoro, kiu pli kaj pli malaperas, oni dediĉas pli da sciencata atento. La konservado de maloftaj bestoj estas plej bone ebla en natur-parkoj laŭ amerika modelo. Oni nuntempe konsideras la starigon de 25 tial parkoj en diversaj partoj de Rusujo.

Sciencaj kongresoj.

Germana Atavista Societo kongresis de 24. IX. ĝis 26. IX. 1923 en München. Referatoj: Winkler H.: „Rolo de la protoplasmo en la heredo“; Renner: „La abortitoj devenantaj de krucigo“ kaj Spemann: „Hereditaĵo evolud-mekaniko“. La sekretario de tiu altsciencata kongreso estas profesoro Nachtsheim (Berlin-Dahlem, Institut für Vererbungsforschung).

Ekonomio.

Arta sterk.

Por la fekundigo de la tero oni ĉiam uzis la naturan sterkon. Ĝi donas al la tero la necesajn materialojn — nitrogeno, fosforo, kalio kaj diversaj mikroboj — kiuj estas necesaj por la nova greno. Tiu ĉi grava problemo okupigis la eminentajn agrikulturkemiistojn Dehérain kaj Wollny (Anglujo). Ili produktis artan sterkon, kiu estas same bona kiel la natura. La metodo estas simpla. Ili impregnas fojnon en amoniuma likvaĵo 37,5 kg da sulfuracida amoniumo kaj 50 kg da pulvorigita kalko sulfatas por 1000 kg da fojno por estigi la necesan fermentadon. Se oni ankoraŭ aldonas iom da fosforo kaj kaliumo, la arta sterkto eĉ superas la naturan.

El Hungara Natursciencia Revuo.

Filatelio.

Jubileaj poŝtmarkoj en Ĉeĥoslovakio.

Por festi la 5 jaran datrevenon de sendependiga Ĉeĥoslovaka Respubliko, la estraro de ĉeĥoslovaka poŝto eldonas apartajn jubileajn poŝtmarkojn.

La poŝtmarkoj aperos je 28. oktobro 1923 kaj estos vendataj en ĉiuj poŝtofcicejoj de tuta respubliko ĝis 31. decembro 1923.

La plena serio konsistas el kvar valoroj. Aperos 1, 2, 3 kĉ. kaj 50 helera. Unu plena serio kostas eĉ la poŝtofcicejo 15 kĉ., do la nominala valoro plus 100%. La 100% plipago estas donota por ĉeĥoslovaka ruĝa kruco. La poŝtmarkoj estos uzebaj por enlanda kaj eksterlanda afranko ĝis 31. decembro 1923.

La jubileaj poŝtmarkoj montras la plej novan portreton de prezidanto Masaryk, en dimensioj 20x23 mm.

Johano Kratochvila,

del. UEA, Sered (Slovakio).

Por eksterlandaj samideanoj-filatelistoj mi povas la jubileajn poŝtmarkojn aĉeti, se oni sendas al mi en rekomendita letero 15 kĉ. plus 20 procentoj por poŝta elspaco. Mi akceptas ankaŭ alian egavatoron.

Tekniko.

Oni utiligas la varmecon de la tero.

La loĝantaro de Italujo multe suferas de la vulkanaj erupcioj. En Larderello (Pisa) la firmao Larderel uzas la ĥaladzojn por produkto de la farfro (kemia acido). Ankaŭ oni movigas per la tera varmo maŝinojn, precipe per la varmaj akvoj de certaj fontoj. La gasojn (180°) oni uzas por motoraj celoj. Per la varma akvo oni heftas kaldronojn kaj laste oni starigis grandan turbogeneratoron por tiu celo (250 kw.). Tiu ĉi uzino produktas rotacian fluon de 4000 V. da tensio. Per la produktiva fluo oni ne nur kontentigas la proksimajn konsumantojn, sed eĉ provizas la ferlandejon en Piompo kaj la kupro-kaj feruzinojn en Massa. Ĉiuj kondukil-tuboj, eĉ en la kaldronoj, konsistas el aluminio. Fero rustiĝas sur tia vulkana teritorio.

Ĉiuj tiaj uzinoj havas la malbonan flankon ke la malgranda premo necesigas grandajn — do malekonomiajn maŝinojn. Ĉar la moviga forto estas senpage liverata de la naturo mem, spite la grandaj inventkostoj oni eĉ en Ameriko instalas tiajpecajn uzinojn.

Josefo Major, Budapest

Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.

La Instituto volas labori por nia movado ankaŭ dum la nuna malbonega ekonomia stato de Germanujo. Ĝi ankaŭ estontempe respondos al ĉiuj demandoj kaj zorgos pri ĉiuj aferoj, kiuj apartenas al ĝia kompetenteco. Sed al personoj kaj institucioj, kiuj ĝis nun ne finance subtenis ĝin, ĝi bedaŭrinde nur povos servi, se oni, demandante aŭ petante ion, aldonos al la konkerna letero la sumon necesan por la poŝta sendkostoj de la atendiata respondo. Ĉiu samideano, kiu komprenas la nunan situation de nia lando, ankaŭ komprenos ĉi tiun sciigon.

D-ro Dietterle, direktoro.

Parolejo.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberalaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin iun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifizi netaŭgajn artikolojn.

226. Refoje: „Ne jam, ne ankoraŭ“.

Ril. al 201.

Verŝajne la opiniesprimoj 216, 217 kaj 218 estis jam en Horrem, kiam elvenis n-o 160 de ET kun la artikoleto de s-ano H. Wagner, Fürth (Parol. 214), pri la temo „ne jam, ne ankoraŭ“. Tiu linio estis modele klaraj, kaj eble s-anoj Vimson, Medem kaj Dreher en ĝi jam trovis partan respondon pri siaj duboj. Mi skribis: „La infano ne ankoraŭ ploras“. Tio estas ĝusta. Oni (kaj ankaŭ mi) ĝenerale diris: „La infano ne ploras ankoraŭ“. Kaj tio ankaŭ estas ĝusta. Ne temas simple pri „plorado“, sed pri „ankoraŭ plorado“. Oni diras: „la infano ankoraŭ ploras“ aŭ „la infano ploras ankoraŭ“, kaj en ambaŭ okazoj „ploras“ kune kun „ankoraŭ“ estas ununura tutajto, kaj en la frazo „la infano ne ankoraŭ ploras“ ne estas neata nur „ankoraŭ“, sed la tuta ideo „ankoraŭ ploras“, samkiel en „la infano ploras ankoraŭ“ estas neata la tuta ideo „ploras ankoraŭ“ kaj ne nur „ploras“.

„La infano ne ploras plu“ havas imete alian sencan: „ankoraŭ“ signifas „de pli frua tempo ĝis la dirita momento“; „plu“ signifas „de la dirita momento estonten“; ekz.: „Kiam vi venis, mi ĉeestis ankoraŭ“ = „mi ĉeestis de pli frua tempo ĝis la momento de via alveno“. (Tamen la ne estas dirite, ke mi ne ĉeestis poste!). Sed: „Foriru, se vi volas, mi restos plu (ne: ankoraŭ)“.

Nu, infano, kiu „ne ploras ankoraŭ“ (kiu jam ne ploras en la dirita momento), verŝajne ankaŭ „ne ploras (prefere: ploros) plu“. En la praktiko do ankaŭ ne estas diferenco inter „ne ankoraŭ“ kaj „ne plu“. Tial — se oni volas flankei la severan, logikegan teorion, kiu, cetero, malpermasas „plu“ kun as-tempo! — oni povas eĉ diri: jam ne = ne ankoraŭ (= ne plu).

S-ano Medem diras, ke „jam ne“ ne lasas lokon al malkomprenigoj. Li estas prava. Sed mi miras, ke li, kiu perfekte parolas la Germanan kaj kredible ankaŭ aliajn lingvojn de okcidenta Eŭropo, ne pripensis, ke okcident-Eŭropanoj ne voonte aplikas „jam ne“.

S-ano Dreher opinias, ke la frazo „Vladimir diris eĉ ne unu vorton“ povus signifii, ke li diris pli ol unu vorton. Ankaŭ ĉi tio estas erara. „Eĉ“ — se ĝi staras antaŭ nombro — signifas proksimume „ne malpli, ol“ = Oni atentu, ke „ne malpli“ ne estas analoga al „pli“, ekz. „mia avo estas eĉ 89-jara“ signifas ke li estas ne malpli ol 89-jara, sed ne, ke li estas pli ol 80-jara. — Se mi do metas „ne malpli, ol“ anstataŭ „eĉ“, ni havos: „Vladimir diris ne malpli, ol ne unu vorton“. Por komprenebliĝi ĉi tiun misteran frazon, ni konsideru, ke duobla neado estas simpla „s-ado“, resp. ke du „ne“ sin paralizas reciproke. Ni sekve povas forigi la du „ne“ kaj havos la saman sencan: „Vladimir diris malpli ol unu vorton“.

„Vladimir diris eĉ ne unu vorton“ do ne signifas, ke „Vladimir diris pli ol unu vorton“. — Quod erat demonstrandum!

Karl Minor, L. K.

(Per tio ni finigas tiun ĉi interesan kaj instruigan diskutadon. Red.)

227. Neksta.

Ril. al 220.

S-ano Medem malaprobis la neologismon nekst' ial, ke ĝi — laŭ lia opinio — ne estas necesa kaj ne internacia.

Ne nur la Germana, sed ankaŭ la Angla lingvoj enhavas la radikon „nekst“, kaj tial mi opinias, ke ĝi estas sufcie konata por esti komprenebla.

Aliflanke, mi opinias, ke estas pli bone, ke la aŭtoroj uzu neologismojn kompreneblajn, el inter kiuj aŭtomate remalaperos tiuj, kiuj ne estas necesaj, ol ke la Esperantistoj serĉu kaj ne trovu kompreneblajn vortojn por ideoj kaj nuancoj, kiujn ili volas esprimi.

Sed ĉu jam ekzistas iatiga vorto aŭ formo por la ideo „nekst“?

La Francoj volonte uzas „proksima“, sed tio estas malproksima. „La proksima mateno“ estas „la mateno ne malproksima“.

Multaj aŭtoroj skribas ekz.: „la venontan tagon li volis forvojaĝi“; sed tio ne estas korekta, ĉar tio signifas, ke li volis forvojaĝi, kiam la tago estis venonta. Korekte estus: „la venintan tagon (i.e. kiam la tago estos veninta) li volis forvojaĝi“. Sed la korekta apliko de ĉi tiu dirmaniero prezentas malfacilaĵojn al preskaŭ ĉiuj.

„La morgaŭa mateno“ oni povas diri, nur se oni parolas en as-tempo. Oni neniam scias, kion alportos la morgaŭa tago“, sed ne: „li tiam ankoraŭ ne sciis, ĉu lia amiko alvenos la morgaŭan tagon“.

Korekta kaj samtempo simpla estas la uzo de „posta“ en ĉi tiu senco:

„oni neniam scias, kion alportos la posta tago“, „li tiam ankoraŭ ne sciis, ke lia amiko alvenos la postan tagon“.

„la postan tagon li volis forvojaĝi“.

Do: se oni ne volas aprobi la uzon de „neksta“, oni anstataŭe rekomendu „posta“ (ne: morgaŭa); sed mi ne scias, kiel mi jam diris ĉi-supre, kial oni ne uzu krome la vasikonatan radikon „neksi“, kiu mem pruvos, ĉu ĝi estas laŭga kaj ĉu ĝi plaĉas al la samideano aŭ ne.

Karl Minor, L. K.

(Plej simpla estas la aprobo de l' propono kun „posta“ de s-o K. Minor laŭ la jam ekzistanta solvo de la demando Kial ŝargi la lingvon per superfluaĵ, „nuancigoj“ kaj balasto? Red.)

228. „Boskano“ kaj „laborumi“.

La nova vorto „boskano“ (vidu „Revuo“ n-o 9, paĝo 75) ŝajnas al mi malrafata. La piednoto montras, ke en 4 lingvoj la vorto estas tre simile transkribata kaj elparolata; ankaŭ en la rusa ĝi estas „buŝmano“. Do, mi opinias, ke estus pli bone, se la dezirinto anstataŭ la vorto traduko, simple Esperantigas la preskaŭ internacian vorton, ĉar „buŝmano“ estus komprenata de ĉiuj, same kiel aeroplano, lokomotivo kaj aliaj internaciaj vortoj.

„Laborumi“ (tib. paĝo 78: ... estus malekonomie laborumi la minejon ...). La vorto kaj la aliaj kun la sama radiko (ekz. laborumado) havas la sencan — prilabori. Kial do enkonduki novan radikon, precipe enhavantan evitindan sufiksion um, kaj kompliki la lingvon?

R. Lorentson, Tallinn.

(Pri la uzo de la vorto „Boskano“ ni estas kulpaĵ. En nia vortaro trovinte la uzofan vorton ni preferis uzi la etimologie ĝustan kaj naturan formon, anstataŭ alia de la originale, devenantan de holande bosch=bosko, man=ulo, ano. — Ŝajnas al ni nun, ke la vorto estas tute internacie uzata kaj pro tio preferinde, uzi la grafikan kaj fonetikan transskribon „Buŝmano“. Nun ni trovis tian ĉi vorton ankaŭ en la nova vortaro de Wüster. Red.)

Abon-Tarifo.

Nuligante la koncernen informon en ET 157, ni sciligas, ke de post la 1-a de oktobro la monata abonprezo fundamenta en Germanujo estas Mk. 1.— x ŝlosilnombro.

Rekte sendataj unuopaj numeroj kostas fundamentan prezon de Mk. 0.50 x ŝlosilnombro. Anoncetoj kostas post la indikita dato por abonantoj fund. prezon de Mk. 1.50 x ŝlosilnombro, por neabonantoj Mk. 2.40 x ŝlosilnombro. Ni ripetias nian peton pri nepra atento je niaj kondiĉoj. Pri demaĵoj kaŭzitaĵ per neatento suferas la mendanto.

Kibbo Kift.

Saluton al la Frataro de la Esperantistoj tra la Mondo!

Blanka Vulpo, la ĉefo de la Frataro de Kibbo Kift, parolas — (kiel oni diras per la senfadenaj stacioj):

Ni alvokas al vi, longe starigita internacia lingvo movado, etendi la manon por helpi nin, de la Kibbo Kift a Frataro, kunligi la gejunularon de la mondo kontraŭ la fortoj de avareco, milito kaj malordo.

Ni volas ke niaj kvar ĉefaj punktoj estu radiotelegrafie disvastigata al ĉiu knabo kaj knabino, vivanta hodiaŭ sur ĉi tiu maljuna tero:

„Mi volas esti Kibbo Kift kaj —

1. Kamploĝi kaj estati sana,
2. Helpi aliajn,
3. Lerni ian utilan metion kaj
4. Labori por Mondpaco kaj Frateco.“

„Kibbo Kift“ estas stranga titolo por movado, kaj eble vi estas scivolema kion ĝi signifas.

„Kibbo Kift“ estas du malnovaj anglaj vortoj kiuj signifas „Forta“ aŭ „Pruvo de Granda Forto“; ĉar ĉiu membro de Kibbo Kift faras sian eblon estadi forta en korpo, menso kaj spirito.

Ni havas unu komunan celon: m o n d a u n e c o .

Ni ankaŭ havas unu komunan malamikon: m a l e n e r g i o (korpa, mensa aŭ spirita).

Multaj el niaj fratoj estas avidaj kaj deziremaj lerni Esperanton, kaj eĉ dum mi skribas, mi sciligas pri triboj kaj loĝioj kiuj komencis la studadon de ĉi tiu lingvo kiel paron de ilia praktika „laboro por mondopaco kaj frateco“.

La Centra Adreso de Kibbo Kift estas: 79, The Grove, Wandsworth, London, S. W. 19, Anglujo.

Pacon kaj bonan ŝancon sur la mondo-vojo!

„White Fox“ (Blanka Vulpo).

Grava!

Oni vendas germanajn patentajn elpensilojn (D. R. G. M. & D. R. P.) Bonaj artikeloj, malmaltekste fabrikelaj. Por la elspezoj aldoni la valoron de ĉi sup. ktp. en nacia mono (ne en kupono).

P. Becker, Del. U. E. A. Augustinerstraße 58, Mainz a. Rh. Germanujo.

IDOJ DE ORFEO.

La tre interesa romano, originale verkita en Esperanto de H. J. Bulthuis, rekompencita de la Akademio 1923, estas havebla en:

Anglujo ĉe: Brita Esperantista Asocio, 17 Hart Street, London W. C. 1.

Belgiujo ĉe: Belgia Esperantisto, dir.: s-o F. Schoofs, 45 Kl. Beerstraat, Antwerpen.

Finlando ĉe: Esperanto-Oficejo, 20 Kasarminkatu, Helsinki.

Francujo ĉe: Esperantista Centra Librejo 51 Rue de Clichy, Paris (9).

Nederlando ĉe la eksploatanto:

CENTRA ESPERANTO-LIBREJO,
2a Bankastr. 's-Gravenhage.

La Kvinjaro de Sovetlandoj

Belarie eldonita libro 80-paĝa kun 70 portretoj kaj ilustraĵoj, traktanta pri la Oktobra Revolucio kaj postrevoluciaj jaroj de la Sovetaj Respublikoj. Trad. de V. Polakov. Eldonita de CK de SEU.

Prezo por malbonvalutaj landoj 1 sv. fr. por mezvalutaj 2 sv. fr., por bonvalutaj 3 sv. fr.

Oni pagu nur per monbiletoj firmvalutaj en rekomenditaj leteroj laŭ la adreso:

Moskvo, Ruslando, Poŝtkesto No. 630, Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo.

Pollandaj Esperantistoj, mendu por la vintraj kursoj „Kompletny Podręcznik Esperanta“ de Leo Turno, L. K.

laŭde recenzita de ET, Pola Esp., Germ. Esp. k. a. Prezo 70 mil pol. mk.; 10 ekz. 925 mil pol. mk.

Leopold Dreher, Kraków, Starowiślna 57

La nova eldono de

BES-a Adresaro

ius aperis.

Prezo: 1 svis. franko. Duona prezo por malbonvalutuloj.

Mendu ĝin senpere ĉe

Butin & Jung, G.m.b.H.,
Esperanto-Eldonejo
Godesberg (Germanlando)
Bahnhofstrasse 30,
Poŝtĉeka konto Kōn 920 36.

la nov-aperinta

Valora libro estas

„Litova Almanako“

285 paĝoj de modela, instrua kaj interesa enhavo.

Prezo 3,50 sv. frk.

Mendu tuj ĉe la

Adminstr. de Esperanto Triumfonta
Horrem b. Köln.

Livro al abonantoj de ET kontraŭ depreno de resp. nombro de ET-numeroj el la abonkonto.

Anoncetoj.

FIANĈIGO. S-o Josef Hartmann, Inĝeniero en București (Rumanio) fianĉigis kun fino Lotie Karășek en Biala (apud Białystok, Polujo).

EDZIĜO. S-o Francisko Izsak, bankĉefo en Targul-Mureș kun fino Elza Lieber el Oradea-Mare (Rumanio) edziĝis la 14-an de oktobro.

KOMERCISTOJ! Mi deziras intertrakti kun eksterlandaj komercistoj pri eksporto (speciale maŝinoj kaj industriaj) kaj importo: akceptas peradojn; serĉas reprezentantojn. Wilhelm Klauke, komercisto, Peterheinstr. 30, Nürnberg (Germanujo). [2]

KIO DORMETAS EN VI? Sendu al mi vian naskiĝdaton, profesion, iom da skribaĵo de vi kaj 1.50 sv. fr. aŭ egalvaloron, kaj mi diros al vi, kion vi povas atingi en via vivo. Grafologo H. Chlubna, Wien V, Storkgasse 12. Sendu rekomendite. [2]

NIA SAMIDEANO VLADISL. MIESEĈ en Budapeŝto estas treege malfeliĉigita (blindigita kaj paralizita je ambaŭ kruroj) kaj nuntempe li estas estas devigita dividi siajn enspecojn inter kvar (aliaj eksmilitistoj) pro kio neniu el ili povas vivi. Mi petegas vin, samideanoj, precipe bonvalutuloj, helpu kiel kaj kiam eble plej povos. Jen okazo vera montri Zamenhofan spirion. Donacojn perados Vera Menzel, apotekestro, Breslau, Hohenzollernstrasse 20. (Rekomendita de la redaktito). [1]

KOLEKTANTO! Por 100-1000 pm. el ĉiu lando mi sendas la saman kvanton de Germanujo. Mi havas grandan kvanton da pm. Mi ankaŭ korespondas kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Mi sendas kaj skribas tuj kaj ĉiam. Mi ankaŭ interŝanĝas papermonon. S-o Rich. Kluka, Bernstadt en Schies., Junkernstr. 5. (German.) [2]

EDZIĜIĜ deziras inteligenta fraŭlino (hebrea) el plej bona familio, oficistino, havante aranĝitan loĝejon, kun inteligentaj simpajiaj hebreoj, Esperantisto, komercisto, oficisto ktp. Inter 30-40 jaroj. Leterojn kun portretoj sendu al: Anna Förster, Kraków (Polujo), Poste restante. Korespondas Esperante, pole kaj germane. [1]

LA GORNA-ĜUMAJA LERNANTA GRUPO intencas aranĝi ekspozicion de Esperantistoj je la 2. decembro k. l., tial ni petegas ĉiujn gesamideanojn sendi al ni ekspoziciaĵojn. Adreso: Stefan N. Vardev, IV uĉ, Nr. 351, Gorna Gumaja (Bulg.). [1]

GRAVA POR SPORTISTOJ! Aranĝante informoservon ĉe polaj sportaj ĵurnaloj, mi deziras ricevi sciigojn de ĉiulandaj Esperantistoj pri silanda sporto. Bonvolu tuj fari proponojn kaj skribi al J. Kvejjman, Łódź (Polujo), Przejard 14. Interŝanĝas ankaŭ sportajn revuojn. [1]

INTERŝANĜANTOJ ATENTU! Laŭ ĉiu foto mi fabrikas belege koloritajn Esperanto-glumarkojn, montrantaj vian portreton, nomon kaj adreson. Uzeblaj por fermi leterojn, beligi leteropaperon aŭ por interŝanĝo. La foto estos nedefekte resendata. Prezo: por 12 ekz. 1.20 sv. frk., 36 ekz. 2.50 sv. fr. aŭ egalvaloron. Franz Christoph, Wien V, Getreidemarkt 15. [1]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

F-ino Marie Hanusch, Trautenau, Kirschengasse 21, Bo hemujo (Ĉeĥosl.) deziras korespondadi kun la tutmondo per il. pk. [2]

800-200 pm. nedifektajn de mia lando ricevos tiuj, kiuj sendas al mi la saman kvanton de silandaĵ. S-o Eugen Wildfeuer, Levuĉa, Spiš, Ĉeĥoslovakio. [2]

S-o Béla Jukl, X Högly. u. 48, Budapeŝto (Hungario) deziras trovi konstantajn korespondantojn el la tuta mond o, precipe fraŭlinojn, il. pk. Esperante kaj franclingve. [2]

NASKIĜO. Al sinjoro Heinrich Schwarz, knaĉfeto de la firmao „Ignatz Schwarz Neffen“, Trautenau (Ĉeĥoslovakio) naskiĝis tre forta, sana filio. [1]

Mi deziras interŝanĝi pm., pk. kaj papermonon. S-o Isaj Czerny, Ogradowa 25, Warszawa, Polujo. [2]

S-o Démétrius Joannides, P. B. 98, Port Said (Egiptujo) deziras korespondi pri filologio, filozofio kaj ĉiaspecaj [2]

S-o Démétrius Joannides, P. B. 98, Port Said (Egiptujo), deziras korespondi pri filologio, filozofio kaj ĉiaspecaj temoj pri belaj artoj kun gemajkoj de ĉiuj landoj per il. pk., l. gaz., revuoj, libroj kaj malofitoj. Li ĉiam respondas. [2]

S-o K. de Witte, Radsakerweg 28, Deventer, Nederlando, deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj per il. pk. kaj l. [2]

S-o A. Hameliuk, Rembrandstr. 71, 's-Gravenhage (Nederlando) deziras korespondadon kun gesamideanoj el tuta mondo per pk. il. kaj l. [2]

S-o J. Van den Steen, Staatsnormaalschool 8, Gent, Belgujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo. [2]

S-o Ludoviko Hiob, Estonio, Valk, Voru tanav n-o 22, deziras interŝanĝi pm. kaj korespondad per il. pk. kun Amerikal, Azial, Afrikal, Aŭstralaj landoj, kun Rusujo (Kaŭkazo, Siberio, Turkujo kaj Islando). [2]

Fraŭlo Ludoviko Haukowitz, oficisto, Ciocrac 29, Brașov (Rumanujo), Transilvanio, deziras korespondadi per il. pk. kun la tuta mondo. [2]

Sendu unue 100-200 papirg. nedifekt. pm. kontraŭ samkvanton aŭstr. (espece Germ.) Pension Esperanto, Wien, Argentinierstr. 85 (Aŭstrujo). [2]

Pri aerveturo, aerveturaj aferoj kaj pri fondo de Internacia aervetura Ligo kun ĉiulandaj specialistoj kaj interesuloj, deziras korespondi en lingvoj Esperanta, Franca, Rusa, Germana kaj Bulgara s-o St. St. Djudjev, str. Pirotska 48, Sofia, Bulgario. [2]

S-o B. Czechowski, Malgrand-Polujo, Borislav, domaro de „Nafta“ XVI, modelistoj, deziras korespondi metite kun sammetistoj, metalistoj, teklistoj. Ŝanĝas profesiajn lernolibrojn il., ankaŭ metiaĵojn. [1]

Fraŭlo Korösi Ferenc, Budapeŝto V, Széchenyi-utca 1 (Hung.), prokuristo, 31-jara, deziras korespondi per l. kaj il. pk. kun kleraj ĉiulandaj gesamideanoj. Korespondas ankaŭ france, germane kaj itale. [1]

S-o J. T. Jokinen, Bulevardiuku 2, d. 17, Helsinki (Finlando), deziras korespondi kun ĉiulandaj Esperantistoj (precipe kun fraŭlinoj) per l. kaj il. pk. [1]

S-o Alfons Kötzschke, ferkomercisto, Trautenau, preĝejo lauba 21 (Ĉeĥosl.), deziras korespondadi per il. pk. k/ l kun Japanujo, Ĥinujo, Persujo, Aŭstralio, Javo, Ruslando, Turkujo, Afriko. Ŝanĝas ankaŭ pm. kaj monetetojn. [1]

S-o Rudolf Müller, Georgsplatz 44, Brand-Erbisdorf i. S. (Germ.), deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiulandaj pri ĉiuj temoj. Li kolektas Esperantistojn kaj jun. [1]

S-o Reinh. Larsson, Kyrkogatan 115, Amål (Sved.), deziras interŝanĝi il. pk., l. kaj gazetojn kun samideanoj el la tuta mondo. [1]

Interŝanĝo de poŝtmarkoj pogrande (5-20 pecoj de unu speco) ankaŭ sur folioj kun ĉiuj landoj. Fuŝsendataĵoj malakceptataj. Respondas ĉiam. Bazo Vveri, Senf ktp. S-o Jan Basil, St. Ostrava 955 (Ĉeĥosl.). [1]

F-ino Manjo Bastová, St. Ostrava 955 (Ĉeĥosl.), deziras interŝanĝi pk. bildflanke afrankitajn kun ĉiuj landoj. [1]

Mi deziras korespondi ĉefe aŭ Esperante kun pentristo (dom-, ligno- aŭ literpentristo) en Ĉeĥoslovakio pri la metio kaj laborkondiĉoj, situacio de la laboristaro en Ĉeĥoslovakio ktp. C. J. Degenkamp, Rietsstraat 40, Utrecht (Nederlando). [1]

26-jara deiektivo (tutmonda pollicigano) korespondas kun tutmondaj intelektualaj gesamideanoj pri diversaj temoj, prefere kun fraŭlinoj kaj samkataloj, Josef Sprušansky, Nádor strato 54, Komarno, (Ĉeĥoslovakio). [1]

Atenton! Isaj Dratwer, Warszawa (Polujo), Muranowska 26/28 elsendas por 1 sv. fr. aŭ egalvaloron, 15 sovjetajn plus 10 polaj pm. Ĉiuj bonkvalitaj, diversaj, nedifektaj. Ankaŭ deziras interŝanĝi pm., pk. il. kun Turkujo, Grekuj, Eksteretropoj. [1]

Filatelistoj! Por 2 svis frk. aŭ egala valoro mi sendas 50 div. malofajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Interŝanĝas pm. Oskar Köhler, Ölsnitz i. Vogtl., Bergstr. 5. [15]

Kiu sendos al mi 80-100 pm. de sia lando, ricevos saman kvanton de mia lando. Mi ankaŭ korespondas per il. pk. kun ĉiulandaj gesamideanoj. Herm. Wolfertz, Menzelen-O, Reinlando (Germ.). [1]

S-o Moses Jehin, str. Gieldona 8, Białystok (Polujo), deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun la tuta mondo. Interŝanĝas ankaŭ papermonon. [1]

S-o Raymond Duran, Sainte-Marie, Pyrénées Orientales (Francujo), deziras korespondi l. kaj pk. kun la Esperantistoj de la tuta mondo. [1]